

Johann Wolfgang von Goethe, Trovita <i>tradukita de Antoni Grabowski</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Trovaĵo <i>tradukita de Ri- chard Schulz</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Trovita <i>tradukita de Manfred Retzlaff</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Gefunden
Mi foje arbaron Promene eniris, Kaj serĉi nenion En penso deziris.	Mi vagis sola En la arbar'. Nenion serĉi Jen mia far'.	Mi tra arbaro Sencele iris Kaj trovi ion Mi ne deziris.	Ich ging im Walde So für mich hin, Und nichts zu suchen, Das war mein Sinn.
Mi vidis, en ombro Jen staras floreto: Steletu lumanta Aŭ blu-okuleto.	Enombre vidis Floreton mi. Lumanta stelo, Okulvizi'.	Ĉe l' vojo vidis Mi etan floron, Kaj ege tuŝis Ĝi mian koron.	Im Schatten sah ich Ein Blümchen stehn, Wie Sterne leuchtend, Wie Äuglein schön.
Mi volis ĝin ŝiri, Sed plore ĝi diras: "Ĉu por ke mi velku, Vi tial min ŝiras?"	Al mi plukonta Jen ĝia vort': „Ĉu ke mi velku Al frua mort' ?“	Kaj kiam volis Mi ĝin deŝiri, „N rompu min!“ mi Ĝin aŭdis diri.	Ich wollt' es brechen, Da sagt' es fein: „Soll ich zum Welken Gebrochen sein?“
Do mi ĝin elfosis Kun radikareto, Kaj portis al mia Ĝarden' ĉe l' dometo.	Mi ĝin elfosis Kun la radik' Ĝin portis domon Al la larik'.	Kaj mi singarde Ĝin elterigis, Al mia domo Ĝin translokigis.	Ich grub's mit allen Den Würzlein aus, Zum Garten trug ich's, Am hübschen Haus.
En loko trankvila Plantite karese, Ĝi kreskas, burĝonas, Kaj floras senĉese.	Replantis tie Ĝin en la fru'. Ĝi nun kreskadas Kaj floras plu.	Alialoke Ĝi nun kreskadas, La eta planto Kaj plu floradas.	Und pflanzt' es wieder Am stillen Ort; Nun zweigt es immer Und blüht so fort.
...	...	...	...

Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 - †1921-07-04).

Arg-376-741 (2006-12-14 00:07:48)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi traduk-version en la interreto, en la retejo de s-ano Don Harlow, en <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnasos/>, precize sub <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnasos/trovita.html>.

Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 - †1997-09-26) en 1984-07.

Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)

Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj", kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Mindeno (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).

Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1982-05-05.

MR-010-1 / Arg-376-739 (2006-12-11 22:15:22)

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22).

Arg-376-738 (2006-12-11 22:11:49)